

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO □ OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
12. strato Gracia. — **SABADELL**
BARCELONO-HISPANUJO

A VIZO: La Redakcio konservas al si la rajton korekti laŭ bezone la manuskriptojn. Neakceptitajn manuskriptojn oni ne resendas.

NIA DEVIZO : « MARO ESTAS GUTARO »

ENHAVO: Popularitat! — Gentoj kaj lingvo internacia. — La rosguto. — La granda arbo. — La patra amo. — Ĉiela peco. — La spiona infano. — Novembro. — Profesoro Dro. Siegfried Lederer. — Enlanda Movado. — Diversaj notoj. — Korespondado.

UNUA LITERATURA KONKURSO



FINO. MARIA CABALLERO ROIG
Regino de la Festo

POPULARITAT!

Avui publiquem la notícia de *La Gaceta*, de Madrid, relativa a la reial ordre per la qual s'autoritza l'explicació de cursos de l'idioma Esperanto en els establiments oficials d'ensenyança, per professors designats per les associacions esperantistes. Aquest fet, a més a més del gran pas que representa per al definitiu triomf d'Esperanto, aludeix poderosament lo que representa i es l'oficialització de l'Esperanto. I en els moments actuals ens suggereix quelques reflexions que considerem oportú exposar.

Si no y agués agut a Espanya batecs esperantistes, el senyor ministre poc s'auria sentit empès ad aquesta decisió, ni tampoc auria pensat en l'Esperanto. I es que les autoritats en realitat no són més que 'ls instruments de govern del poble : els que tals són, no 'u són més que perquè 'l poble 'ls delega per a que tals siguin. Per això fan lo que 'ls poble 'l mana fer : quan el poble senti la voluntat de fer obligatòria l'ensenyança de l'Esperanto, això manarà a les autoritats, es a dir, això farà per medi de les autoritats, que formulitzaran l'oficialitat de l'Esperanto.

Hem d'anar, doncs, al poble, a fer-li sentir la voluntat d'oficialitzar l'instrucció de l'Esperanto. I aquesta voluntat serà sentida, i serà sentida prou intensament, quan el poble en general no sols cregui vagament en favor de l'Esperanto, sinó que vegi i senti les qualitats de l'Esperanto i les condicions de la nostra causa.

Els cursos gratuïts d'Esperanto que arreu se donen són el medi més eficaç de fer sentir i veure la causa esperantista. Però per tal medi tant sols s'arriba fins ad aquells que, espontaniament, trobant-se en favorables circumstancies, van a concórrer ad aquests cursos. I això no es prou : així no 's generalitza, no 's popularitza prou el sentiment esperantista. S'ha d'arribar també fins ad aquells que, per desfavorables circumstancies o prejudicis erronis, no aprenguin l'Esperanto. S'ha de fer sentir la causa esperantista a tot el poble, per a que mani a les autoritats formulitzar l'oficialitat de l'Esperanto!

I el medi d'arribar ad aquest resultat tot just ara sembla començar a utilitzar-se, i encara, potser, poc conscientment. Me refereixo a la divulgació de l'idea i el sentiment de l'Esperanto per medi de conferencies i mitings, sobre tot quan les circumstancies són propries, com per exemple en l'inauguració de cursos, de grupus, de banderes, etc. I dic que tot just ara sembla començar a fer-se això perquè re volen dir quelques casos aïllats ocorreguts fins ara, mentres que

aquest any tot d'un cop ja tenim conferències anunciades, un miting en el «Casino del Comerç», de Terrassa, i un altra al «Centre de Lectura», de Reus, celebrats com inauguració dels cursos d'Esperanto que s'han oberts aquest any a les esmentades ciutats; una conferència, el diumenge dia 22 d'Octubre, a Vilanova i Geltrú, un acte analògic proper a tenir lloc a Mataró, etc., etc.

I es així com hem de generalitzar la nostra causa i fer opinió. Hem d'invitar a controvèrsia, a més a més, els qui emeten asercions desfavorables a la causa esperantista, que són sempre aquells que precisament ignoren l'Esperanto; i hem de provar com són falses totes les opinions que senten prejudicis en contra de l'Esperanto; i hem de vigoritzar més els nostres *gesamideanoj* amb les victòries que per aital camí assolirem; i hem d'interessar i fer obrir el cor i els ulls als qui encara no sentin ni vegin els nous sentiment i idea de l'Esperanto, que són lo més umà, noble i gran que l'ome fins avui agi pogut sentir i veure.

Enlaire ! cor i enfora ! pit, doncs, *gesamideanoj* !

A lluitar, que la nostra lluita produeix el goig de la vida útil i benefactora per a tots els germans omes ! i no sols d'avui, sinó també de demà i de tota l'umana futuritat !

Delfí DALMAU



GENTOJ KAJ LINGVO INTERNACIA¹

ESTIMATAJ Sinjoroj ! Kvankam la nomo de Via kongreso estas «Kongreso de *Rasoj*», tamen permesu al mi, ke mi parolu ne sole pri *rasoj*, sed ankaŭ pri *gentoj*, ĉar ambaŭ egale signifas etnologia grupon da homoj kaj diferencas nur per sia amplekso. La samaj rilatoj, nur eble en pli aŭ malpli granda mezuro, regas inter la gentoj, kiel inter la rasoj, kaj tre ofte estas malfacile diri, ĉu tiu aŭ alia homa grupo prezentas rason aŭ genton.

La reciproka batalado inter la diversaj homaj rasoj kaj gentoj estas la plej granda malfeliĉo de la homaro. Se la Kongreso de Rasoj povus trovi ian rimedon, por forigi, aŭ almenaŭ malfortigi la reciprokan malamon kaj bataladon inter la homaj gentoj, ĝi povus esti kalkulata al la plej gravaj el ĉiuj kongresoj, kiuj iam ekzistis. Sed,

1) Memuaro verkita de Dro. L. L. Zamenhof por la Kongreso de Rasoj, Julio, 26-29, 1911. — London.


por tion atingi, la kongreso devas ne kontentigi sin per teoria rezonado, kiu forflugas sencele, kiel vento, ne serĉi vanajn kompromisojn, kiuj flikas unu lokon, krevigante alian; ĝi devas antaŭ ĉio esplori kaj trovi la *kaŭzon* de la ekzistanta malbono kaj serĉi rimedon, por forigi, aŭ almenaŭ malfortigi tiun kaŭzon.

Kio estas la ĉefa, eble eĉ la sola kaŭzo de la malamo inter la gentoj?

Ĉu cirkonstancoj *politikaj*, t. e. konkurado inter tiuj homaj grupoj, kiujn ni nomas regnoj? Ne! ĉar oni ja scias, ke ekzemple germano el Germanujo ne sentas ian naturan malamon kontraŭ germano el Aŭstrujo, germanoj naskitaj kaj loĝantaj en plej diversaj regnoj havas inter si reciprokajn simpatiojn, dum ekzemple germanoj kaj slavoj, naskitaj kaj loĝantaj en plej diversaj regnoj havas inter si reciprokajn simpatiojn, dum ekzemple germanoj kaj slavoj, naskitaj kaj loĝantaj en la sama regno, rigardas sin reciproke kiel fremdulojn kaj — se la homeco ne superas en ili la grupan egoismon — ili sin reciproke malamas kaj interbatalas. Sekve ne la ekzistado de regnoj kreas la gentojn kaj la intergentan malamon.

Ĉu ĝin kreas la konkurado *ekonomia*? Ne! Ofte efektive ni aŭdas la krimon: «Danĝero! Tiu aŭ alia gento nin ekonomie englutos! Ni malamu ĝin, ni premu ĝin, ni batalu kontraŭ ĝi!» Sed ĉiu homo, kiun ne blindigas ŝovinismo, facile povas kompreni, ke tiuj krioj estas tute sensencaj, ke ni malamas fremdajn gentojn ne ĉar ni timas, ke ili nin ekonomie englutos, sed ni krias pri englutado tial, ke ni ilin malamas. Ĉar se efektive ekonomia timo estus kaŭzo de nia malamo, tiam en ĉiu lando ĉiuj provincoj kaj urboj devus ja tiel same reciproke sin malami kaj kontraŭbatali. Ĉu efektive pro kaŭzoj ekonomiaj ekzemple la milionoj da rusaj malriĉuloj malamas la milionojn da ĥinoj malriĉuloj, dum, por defendi siajn rusajn premantojn kontraŭ fremduloj ili tiel volonte verŝas sian sangon? Kompreneble ne, ĉar la rusa soldato, mortigante ĥinan soldaton, scias tre bone, ke tiu ĉi lasta neniam farus al li tiom da malbono, kiom lia samgenta «pugno». Sekve ne kaŭzoj ekonomiaj kreas la intergentan malamon.

Ĉu ĝin kreas la reciproka *malproksimeco*, la malsameco de la geografiaj, klimataj kaj aliaj cirkonstancoj, kiuj kaŭzas ian naturan fremdecon kaj antipation inter la gentoj? Ne! Malproksimeco kaj malsameco de lokaj klimataj cirkonstancoj efektive kaŭzas kelkan malsamecon de la eksteraĵo kaj de la karaktero de homoj, sed ne kaŭzas gentojn nek intergentan malamon. La geografia kaj loknatura diferenco inter Peterburgano kaj Odesano aŭ inter Kievano kaj Krasnojarskano estas senkompare multe pli granda, ol ekzemple



DUM LA VII^a. — GRUPO DE GEKONGRESANOJ EN LA KORTO
DE LA REGA ATENEO EN ANTVERPENO

inter Berlinano kaj Varsoviano, kaj tamen inter la unuaj regas la sento de plena samgenteco kaj frateco, dum inter la lastaj ĉiam regas la sento de plena reciproka fremdeco kaj plej fanatika intergenta malamo. Sekve ne la malsameco de la geografiaj kaj klimataj cirkonstancoj kreas la intergentan malamon.

Ĉu ĝin kreas la fakto, ke malsamaj rasoj kaj gentoj diferencas inter si per la ecoj de *korpo*? Ne! Interne de ĉiu gento ni havas homojn kun la plej malsama koloro de la haŭto, kun plej malsama grandeco, formo de la korpo kaj de ĝiaj apartaj partoj; ofte du personoj el la sama gento multe pli diferencas inter si reciproke per la korpo, ol ekzemple meza Japano de meza Franco; kaj tamen al neniu iam venas en la kapon eĉ la plej malgranda ideo dividi la membrojn de ia popolo en apartajn grupojn laŭ la korpaj formoj kaj supozoj, ke tiaj grupoj devas sin reciproke malami kaj kontraŭbatali. Pri la plimulto da fremdaj gentoj jam nun neniu el ni dubas, ke la malsimileco inter iliaj korpoj kaj niaj estas por ni tute indiferenta, ni plejparte ĝin eĉ tute ne povas distingi, ofte ĝi eĉ rekte nin allo-

gas, dank' al nekonscia leĝo de la naturo, kiu fiziologie favoras intermikson de la gentoj.

Nur pri unu sola raso al multaj el ni ŝajnas, ke ni havas kaj ĉiam havos kontraŭ ĝi antipation naturan, tio estas la raso nigra. Sed pli atenta primedito facile montros al ni, ke la kaŭzo de tiu antipatio estas tute alia : la nigruloj, kun kiuj ni, blankuloj, kunpuŝiĝas, antaŭ tro nelonge estis ankoraŭ sovaĝuloj kaj poste sklavoj, kaj la plimulto el ili konservas ankoraŭ la karakterajn trajtojn aŭ la sekvojn de longa barbareco kaj sklaveco, kaj tio nin, homojn liberajn kaj jam de longe civilizitajn pure instinkte forpuŝas. La sentoj de blankulo koncerne nigrulon — tiu sento, kiu ŝajnas al ni ia rasa antipatio — estas en efektiveco tute la sama, kiel la sento de hereda aristokrato koncerne krudan kampulon, kiu estas malagrabla al li pro sia neinteligenteco kaj malelegantaj manieroj. Sed kiam post kelka tempo ĉe la nigruloj malaperos ĉiuj trajtoj de estinta barbareco kaj sklaveco, kiam ili atingos potencon gradon da kulturo, elŝovos el sia mezo multe da grandaj homoj — tiam tute sendube la nuna senkonscia malestimo kaj antipatio cedos lokon al respekto, kaj tiam nin jam certe ne forpuŝos ilia nigra haŭto aŭ dikaj lipoj. Ĉiu el ni povas vidi en sia propra popolo multajn personojn, kies korpoj multe pli malplaĉas al ni, ol la korpo de ia alirasano; se iliaj korpoj estas por ni tro malagrablaj, ni eble ilin evitas; sed ĉu pro la formo de ilia korpo ni ilin malamamas aŭ persekutas? Ne! Ne la malsameco de la korpaj formoj kreas la intergentan malamon.

Ĉu ĝin kreas la malsameco de la *mensoj*? Ne! La cerboj kaj la koroj de la homoj el ĉiuj gentoj estas laŭ sia naturo tute egalaj; kaj se ni tiel ofte vidas malsamecon de mensoj, tio estas ne propraĵo *genta*, sed propraĵo *individua*, aŭ dependas nur de la cirkonstancoj, en kiuj la individuo aŭ la tuta gento vivas. Se ni vidas grandegan diferencon inter la mensoj de ia interne-Afrika gento kaj la mensoj de ia Eŭropa popolo, la kaŭzo konsistas ne en la malsameco de la gentaj ecoj, sed en la malsameco de la civilizacio aŭ de la politikaj aranĝoj. Donu al la Afrikanoj sen premado kaj malamo altan homan civilizacion, kaj tiam iliaj mensoj neniom diferencos de niaj. Forprenu de ni nian tutan civilizacion, kaj tiam niaj mensoj neniom diferencos de la mensoj de Afrikanoj hommanĝantoj. Sekve ni havas ĉi tie ne diferencon de gentaj mensoj, sed diferencon de *klereco*, kiun ni en pli aŭ malpli granda mezuro povas vidi ankaŭ inter la diversaj klasoj aŭ diversaj historiaj periodoj de la *sama* gento.

Ke la diversaj mensoj ne prezentas ian apartenaĵon *gentan*, tion pruvas ne sole la fakto, ke egalmaniere edukitaj homoj el ĉiuj Eŭro-

paj gentoj havas tute egalajn mensojn, sed tion ankoraŭ pli bone pruvas la komparo ekzemple inter civilizita antikva Egiptujano, civilizita nuntempa Japano kaj civilizita Eŭropano: ili tri apartenas ne sole al malsamaj gentoj, sed eĉ al tute malsamaj rasoj kaj kontinentoj, kaj tamen — se ni apartigos la cirkonstancojn de tempo, loko kaj religio — ĉu la mensoj de tiuj Afrikano, Aziano kaj Eŭropano ne aperos al ni tute egalaj? Ĉu ekzemple la menso de tute alirasa japana scienculo ne estas la sama, kiel la menso de Eŭropa scienculo, malgraŭ ke ankoraŭ antaŭ 50 jaroj inter la Japanoj kaj Eŭropanoj ekzistis ŝajne kolosa malsameco?

Se unu homa grupo havas aŭ ŝajnas havi iom alian karakteron, ol alia grupo, tio venas ne de ia aparta genta menso, sed nur de apartaj cirkonstancoj, en kiuj la grupo vivas: grupo, edukita en sklaveco, ne povas havi tian kuraĝan kaj liberan tenigon, kiel grupo, edukita en libereco; grupo, kiu ne havis la eblon lerni, ne povas havi tian larĝan spiritan horizonton, kiel grupo, kiu multe lernis; grupo, al kiu estas malpermesite havi aliajn laborenspezojn krom komerco, ne povas havi tian karakteron, kiel grupo, kiu ĉiam vivas kun la tero kaj naturo. Ŝanĝu la cirkonstancojn de la grupa vivo, kaj tiam — kion ni jam ofte vidis en la historio — morgaŭ la grupo A havos la karakteron de la grupo B kaj la grupo B la karakteron de la grupo A. Ne, ne ia malsameco de la naturaj mensoj kreas la gentojn kaj la intergentan malamon.

Ĉu ĝin kreas la malsameco de la *deveno*? Efektive, en la unua momento ŝajnas, ke tio estas la plej ĉefa kaŭzo de la intergenta malamo. Ni scias, ke ĉiu el ni amas «sian sangon», ke ĉiu el ni multe pli amas sian fraton aŭ samfamilianon, ol ĉiun «fremdulon». La in-



DUM LA VII^a. — LA REPREZENTANTOJ DE «K. E. F.» SROJ. J. BREMÓN KAJ F. PUJULÁ KUN SINO. REBOURS DE PUJULÁ KAJ KOLONELO POLLEN, EN ANTVERPENO.

terne altira kaj ekstere forpuŝa apartiĝado de la familioj prezentas jam prototipon de reciproka rilato inter gentoj kaj rasoj, kiuj pro supozo de deveno prezentas ja nenion alian, ol familiojn en pli vasta mezuro. Tamen, kvankam samgentanoj nomas sin «samsanguloj» kaj «fratoj», estas tre facile pruvi, ke la analogio inter familioj kaj gentoj kaj la graveco de la deveno por la intergentaj rilatoj estas nur *ŝajna*. Samfamilianoj scias, ke ilin naskis la samaj gepatroj aŭ la samaj geavoj; samgentanoj analogie kredas, ke antaŭ multe da centjaroj aŭ miljaroj ilin naskis la samaj pra-praavoj; sed tiu kredo estas nur *supozo*, kiu estas bazita ekskluzive nur sur la sameco de la lingvo kaj religio kaj kiu en la plimulto da okazoj estas tute malĝusta. Kaŭze de konstanta intermiksiĝado de la popoloj, neniu (krom kelkaj heredaj kasto, kiel ekzemple la kasto hindaj aŭ la hebreaj kohenoj kaj levidoj) en la nuna tempo povas scii, al kiu gento apartenis lia pra-praavo. Ne sole oni ne povas pruvi, ke ĉiu nuna loĝanto de la tero apartenas al la sama gento, al kiu apartenis liaj malproksimaj praavoj, sed kontraŭe: el tiuj personoj, kiuj *scias* sian devenon (krom la religie fermitaj kasto), la plimulto scias tute precize, ke iliaj praavoj apartenis *ne* al tiu gento, al kiu ili mem nun apartenas. Kaj tamen ĉu iu povus diri, ke ekzemple la grandaj rusaj verkistoj Karamzin, Puŝkin aŭ Lermontov ne estis puraj, plej puraj rusoj, kvankam iliaj praavoj estis ne rusoj?

Ĉiuj paroloj pri deveno kaj hereda sango estas nur frazoj kaj pretekstoj, por pravigi niajn sentojn, kiuj efektive havas tute alian bazon. Ni sentas gentan malamon kontraŭ tiu aŭ alia persono ne pro liaj supozataj praavoj, sed nur tial, ke li *mem* estas fakte fremda por ni per sia lingvo kaj sia religio. Se la gepatra kaj familia lingvo de iu estas la rusa kaj lia religio estas la rusa (grek-ortodoksa), tiam — kia ajn estus ia deveno, kie ajn li loĝus, kian ajn korpan eksteraĵon li havus — li mem kaj ĉiuj liaj ĉirkaŭantoj vidas en li Rusion. Se, kontraŭe, iu eĉ scias tute precize, ke liaj praavoj estis puraj Rusoj, sed li mem havas lingvon kaj religion ne rusajn, tiam nek li mem nek aliaj nomos lin Ruso. Kompreneble, se iu mem ne naskiĝis kun la lingvo kaj religio de tiu aŭ alia popolo, sed nur poste *akceptis* ilin, tiam liaj propraj gentaj sentoj kaj la rilatoj de aliaj personoj al li ofte ne povas subite per unu fojo ŝanĝiĝi; sed lia idaro jam plene kaj por ĉiam solviĝas en la dirita gento.

Estas kompreneble, ke ju pli malproksime (geografie kaj etnologie) staras la akceptintoj de fremda lingvo kaj religio, des pli malrapide estos la procedo de la solviĝado; sed la procedo nepre fariĝos, estos nur demando pri la tempo. Se ekzemple en la centra Afriko

vivus ia popolo, kiu (ne de hieraŭ, sed jam de cent jaroj, ne en la instruitaj klasoj, sed en la tuta popolo) parolus la lingvon franĉan (ne kripligitan, sed tute puran) kaj havuŝ tiun saman religion kaj morojn, kiel la plimulto de la metropolaj francoj, — ĉu tiam la franĉaj naciistoj-ŝovinistoj ne vidus en ili verajn francojn? Multe pli rapide iras la procedo ĉe pli granda geografia kaj etnologia proksimeco. Ekzemple prezentu al vi, ke hodiaŭ ĉiuj hungaroj forgesis por ĉiam la lingvon hungaran kaj komencis paroli nur la lingvon de la germanoj: ĉu en tia okazo post 30-40 jaroj ekzistus inter ambaŭ gentoj ia diferenco aŭ genta malamo? Certe ne, ĉar ili por ĉiam fariĝus unu gento. Prezentu al vi, ke hodiaŭ ĉiuj hebreoj decidis forĵeti por ĉiam la hebrean religion kaj akceptis la religiojn de la popoloj, kiuj ilin ĉirkaŭas; ĉu en tia okazo post 30-40 jaroj ekzistus ankoraŭ ia diferenco inter hebreoj kaj ne-hebreoj, ia «hebreaj problemoj», ia antisemitismo aŭ filosemitismo? Certe ne, ĉar per la ŝanĝo de la religio la tuta tiel nomata «hebreaj raso» por ĉiam malaperus. Sekve ne la malsameco de la deveno, kiu estas nur preteksto, sed ne kaŭzo, kreas la gentojn kaj la intergentan malamon.

* * *

Kio do estas la vera kaŭzo de la intergenta diseco kaj malamo? El ĉio, kion mi supre montris, oni povas jam vidi, ke, malgraŭ ĉiaj kvazaŭ-sciencaj teorioj pri rasaj apartaĵoj, klimatoj, hereda sangogo, k. t. p., la veraj muĝoj inter la gentoj, la vera kaŭzo de ĉia intergenta malamo estas nur la malsameco de la lingvoj kaj religioj. Precipe la lingvo havas tian grandegan kaj preskaŭ ekskluzivan rolon en la diferencado de la gentoj, ke en kelkaj lingvoj la vortoj «lingvo» kaj «gento» estas plenaj sinonimoj. Sed du homoj parolas la saman lingvon, sen reciproka humiligo, kun egalaj rajtoj pri tiu lingvo, kaj dank' al ĝi ili ne sole reciproke sin komprenas, sed havas la saman literaturon (buŝan aŭ skriban), la saman edukon, la samajn idealojn, la saman homan dignon kaj rajtojn, se ili krom tio havas la saman «Dion», la samajn festojn, la samajn morojn, la samajn tradiciojn, la saman vivaranĝon: tiam ili sentas sin tute frataj unu rilate al la alia, tiam ili sentas, ke ili apartenas al unu gento. Se du homoj reciproke sin ne komprenas, se ĉiu el ili krom tio havas tute aliajn morojn kaj vivaranĝojn, tiam ili rigardas sin kiel fremdulojn, kiel mutulojn, barbarojn, instinkte evitas sin reciproke kaj reciproke al si malkonfidis, kiel oni instinkte malkonfidis al ĉio, kio kaŝiĝas por ni en mallumo.

Estas vere, ke multaj el ni povas interkompreniĝi kun aligentanoj, kaj tio estas la kaŭzo, ke en la plej kleraj klasoj la intergentaj muroj estas malpli dikaj; estas vero, ke multaj el ni konas kaj juste taksas la esencon de fremdaj religioj, kaj tio estas la kaŭzo, ke homoj vere pensantaj neniam malamas aligentanon pro la alieco de lia religio; sed por ke reciproka sinkomprenado efektive interligu du homojn, estas necese, ke pri la parolata lingvo ambaŭ sentu sin *egalrajtaj*; por ke la religio ne prezentu muron inter du homoj, estas necese, ke ili ambaŭ ne sole estu reciproke toleremaj en principoj de interna *kredo*, kiu ĉe inteligentaj homoj estas afero individua kaj ne dependas de la gento, sed ke ankaŭ diversaj *eksteraj* religiaj vivaranĝoj ilin ne disigu.

* * *

Ĉio supre dirita alkondukas nin al la sekvanta konkludo *principe*: *La intergenta diseco kaj malamo plene malaperos en la homaro nur tiam, kiam la tuta homaro havos unu lingvon kaj unu religion*; Ĉar tiam la tuta homaro en efektiveco prezentos nur unu genton. Daŭros tiam en la homaro tiuj diversaj malpacoj, kiuj regas interne de ĉiu lando kaj gento, kiel ekzemple malpacoj politikaj, partiaj, ekonomiaj, klasaj, k. t. p.; sed la plej terura el ĉiuj malpacoj, la malamo *intergenta*, tute malaperos.

Principe ĉiu amanto de la homaro sekve devas celi al tio, ke la tuta homaro havu unu lingvon kaj unu religion. Sed ĉu *praktike* tio estas necesa? Ne! Malfeliĉiga por la homaro estas ne la *ekzistado* de la gentoj, sed ilia ĝis nun tute neevitebla reciproka *altrudiĝado*. Ĉiufoje, kiam mi volas interrilati kun aligentano, estas nepre necese, ke aŭ mi altrudu al li mian lingvon kaj morojn, aŭ li altrudu al mi siajn. Kiam malaperos tiu bedaŭrinda *neceseco de altrudado*, tiam malaperos la intergenta malamo. Tute same, kiel por interna paco en ia lando ne estas necese, ke la familioj kun siaj familiaj moroj kaj tradicioj malaperu, sed estas nur necese, ke ili ne bezonu altrudi siajn familiajn apartaĵojn al aliaj familioj kaj ke por ĉiuj *eksterfamiliaj* aferoj ekzistu leĝoj kaj moroj neŭtrale-landaj, tiel same por la paco de la homaro ne estas necese, ke la gentoj nepre malaperu, sed estas nur necese, ke ili trovu tian «modus vivendi», kiu permesus al ili forigi siajn eksterajn pikilojn kaj ne altrudi al si reciproke siajn gentajn apartaĵojn. Estas necese, ke la homaro aranĝu sian vivon tiamaniere, ke: *konservante sian gentan lingvon kaj gentan religion en la interna vivo de sia lingva aŭ religia grupo, la homoj por*

ĉiuj rilatoj intergentaj uzu lingvon neŭtrale-homan kaj vivu laŭ etiko, moroj kaj vivaranĝoj neŭtrale-homaj.

* * *

Kiamanierē oni povas tion atingi pri aferoj *religiaj*, pri tio mi nun ne parolos ĉar : tio ne estas la temo de mia memuaro kaj postulas preparolon tute specialan kaj vastan ; ĉar la religio ne estas io *nature* genta, sed dependas de la volo de la homoj kaj prezentas parton de la homa civilizacio, tial la religia unuiĝo de la popoloj jam de longe komenciĝis per si mem, kaj ĝin malhelpas nur c rkonstancoj tute *flankaj*, kiuj baldaŭ pasos : kiam unuflanke en ĉiuj landoj malaperos la privilegiiteco de tiu aŭ alia religio kaj sekve ĉiu povas ŝanĝi sian denaskiĝan religion sen perfido kontraŭ siaj suferantaj samgentanoj, kaj kiam duaflanke ekzistos religio, kies dogmojn ĉiu homo povas akcepti sen malhonesteco kontraŭ sia konscienco, tiam tre rapide la tuta homaro aranĝos sian religian vivon en egala maniero.

Cetere la unuiĝo religia estas forte ligita kun la unuiĝo lingva. Estas afero tute senduba, ke ju pli la homoj komuniĝados sur neŭtrale-lingva fundamento, ju pli per tiu egalrajta kaj sengenta lingvo ilia literaturo, ideoj kaj idealoj unuiĝos, des pli rapide ili ankaŭ en rilato religia interasimiligos. La tuta problemo de la unuiĝo de la homaro kaj de la malapero de intergenta malamo koncentriĝas sekve en *unu* afero, en *unu sola* afero ; kaj tiun ĉi aferon mi plej insiste rekomendas al via atento, vi, kiuj kunvenis, por pripensi la problemon de amikeco kaj justeco inter la gentoj kaj la rasoj. Tiu afero estas : *por ĉiu rilatoj intergentaj oni devas uzi lingvon neŭtralan, por ĉiu facile akireblan, al ĉiu egalrajte apartenantan.* Al ĉiu, kiu ne volas paroli kun ni en *nia* lingvo, ni parolu en lingvo *neŭtrala*, kaj tiam malaperos la ĉefa kaŭzo de intergenta malamo kaj humiligo ; ĉiu gento, kiu ne volas humiligite akcepti kulturon en lingvo de siaj malamikoj aŭ de fieraj najbaroj, havu la eblon akcepti ĝin en nehumiliga lingvo neŭtrale-homa, — kaj tiam baldaŭ ne ekzistos plu gentoj senkulturaj.

* * *

Ĉu tia neŭtrala lingvo *povas* ekzisti? Jes, ĉar ĝi jam de longe *ekzistas*, bonege funkcias, havas grandegan multon da uzantoj kaj riĉan, potence kreskantan literaturon. Tiu lingvo, kiu havas neniu

materialan aŭ moralan mastron, sed estas plene libera kaj egalrajta apartenaĵo de ĉiuj siaj uzantoj kaj postulas de ili nur, ke apartaj ambiciaj personoj ne rompu kaj ne ŝanĝu ĝin sen komuna interkonsento, — tiu lingvo ne sole ekzistas kaj bonege funkcias, sed ĝi ankaŭ jam nun perfekte plenumas tiun rolon, pri kiu mi supre parolis, t. e., la rolon de interhoma fratiganto kaj de foriganto de ĉiuj muroj kaj malamo inter la gentoj. Kiu volas konvinkiĝi pri tio, kiel bonege tiu lingvo povas esti uzata egale de ĉiuj rasoj; kiu volas konvinkiĝi pri tio, kian grandegan gentunuigan forton posedas tiu neŭtrala, al ĉiuj egale apartenanta lingvo; tiu ne agu kiel tiuj scienculoj, kiuj post kelkjara bonega funkciado de fervojo; verkis grandajn traktatojn pri neebleco de fervojo li ne diskutu teorie, ne babilu pseŭdo-sciencajn frazojn pri rasaj apartaĵoj, sed li vizitu unu el la ĉiujaraj universalaj kongresoj de esperantistoj; li vidos tie la perfektan harmonion inter la gentoj; li vidos per siaj propraj okuloj kaj aŭdos per siaj propraj oreloj, kiel la interrilatado sur neŭtrala, nenium humiliganta fundamento absolute forigas kaj forgesigas ĉiujn barojn kaj fremdecon inter la gentoj, — kaj tiam li komprenos, kion la homaro bezonas, por atingi fine pacon inter la gentoj.

Tion, kion la homaro bezonas, ni ne devas nun plie deziri, ni ne devas kun granda malfacileco kaj duba rezultato provi ĝian kreadon — ĉar ĝi jam ekzistas, kiel senduba, plene palpebla fakto. Ni devas nur *subteni* ĝin.

Neniaj kompromisaj paliativoj, neniam sagacaj politikaj kontrakt-oj donos pacon al la homaro. Sed ju pli la esperantismo fortiĝos en la mondo, ju pli ofte la homoj el diversaj gentoj kunveniĝos kaj interrilatados sur neŭtrala fundamento, des pli ili kutimos sin kompreni kaj ami, des pli ili sentos, ke ili ĉiuj havas egalajn korojn, egalajn mensojn, egalajn idealojn, egalajn suferojn kaj dolorojn, ke ĉia intergenta malamo estas nur restaĵo el la tempoj barbaraj. El tiu neŭtrala fundamento, kaj *nur* el tiu fundamento, iom post iom elkreskos tiu estonta unuigita kaj pure homa homaro, pri kiu revis la profetoj de ĉiuj gentoj kaj tempoj.

Se vi, membroj de la Kongreso de Rasoj, volas, ke viaj laboroj donu realajn fruktojn, vi scios, kion vi devas fari.

L. L. ZAMENHOF



LA ROSGUTO¹

Devizo : « Rozoj kaj dornoj »

En flora kroneto duonmalfermita
 dezerta, izola kaj ja forlasita
 en kiu dormadis papilio bela
 je la tagnaskiĝo, rosguto tre hela,
 en ĝi, dolĉan kison metis ravigita.

Kaj tiu guteto de roso humila
 kun fid' enamiĝis de l' floro ĝentila,
 ne kredis ĝi morti eble tro baldaŭe
 kaj en la kaliko, de kiu ĉirkaŭe
 ĉio bonodoras pro l' ĝojo Aprila,

kaj kie la ĉarma papili' dormiĝis,
 silente l' rosguto rav-ekstaziĝis.
 « Ni ĝuu trankvile je l' horoj plezuraj
 daŭrantaj momenton ! », la tonoj murmuraj
 ellasis, de l' guto kiu pliiĝiĝis.

Sed baldaŭ karese ĝin palpas, ĝin tuŝas
 la varm' sunradia ; tiam ĝin dispuŝas,
 kaj l' antaŭa ĝojo de vibra odoro
 fariĝas malĝoj' en la fundo de l' floro
 kie l' papilio ankoraŭ nun kuŝas.

Aŭdante kanzonon de rava cikado
 vekiĝas la roso de sia dormado
 kaj ĝi tuj ekstremas, silente, senbrue,
 kaj ploras, kaj timas malgaje ; senguë,
 ĉar estas timiga cikada kantado.

« La vivo, tre dolĉa kaj de mi amata
 apud vi ja estis, ho flor' delikata,
 kredante nur ĉiam brile vin amadi ! » ;
 la morto devigas, fine murmuradi
 al roso malvarma, de l' sun' mortigata.

1) Versaĵo kiu atingis la ordinaran premion, en nia unua Literatura Konkurso.

Kaj iom post iom la guto fandiĝas
 dum la varma Suno al ĉiel' leviĝas,
 la greĵojn, la kampojn, ĉion orumante,
 la florojn, foliojn, kun bril' sekigante
 por la hela tago kiu proksimiĝas.

En tiu kaliko de floro krevanta
 la ĝoja rosguto fariĝas dormanta
 kaj restas rigida kaj iĝas senforta,
 batalas al vivo sed tuj iĝas morta
 pro l' troa kareso de l' Sun' varmiganta.

Tiel sian rolon la rosguto ora
 finis, tre ĵaluza de l' kroneto flora
 kie papilio, ĝin ĉirkaŭprenante,
 kiam ĝin malfermos la sun' vekigante,
 alian dolĉkison al flor', donos glora.

J. VENTURA, el Terrassa



LA GRANDA ARBO¹

Devizo : « Ankoraŭ... »

I

PROKSIME de la vojo staras altega arbo, kiu tute ŝajnas enigi sian
 supraĵon en la bluan de la firmamento.

Apud la piedo de l' arbo pasis homo kiu, mire ĝin rigardinte,
 ekkriis:

« Ĝi estas belega arbo ! »

Kaj li daŭrigis sian interrompitan marŝadon.

Poste pasis dua trairanto kaj tiu ĉi, ankaŭ pensis ke la arbo
 estas belega, sed ne malferminte la lipojn por tion diri, pasis ne
 haltinte.

Pli malfrue pasis tria marŝanto kaj tiu ĉi eĉ ne atentigis pri la
 estado de l' arbo.

1) Premiita en nia unua Literatura Konkurso, per la premio de Sro, Di-
 rektoro de l' « Institut de Tarragona ».

II

Fine alvenis du frenezuloj. Unu el ili intencis grimpi ĝin; sed apenaŭ li atingis la unuajn branĉojn falis teren kaj rompigis lia kapo. Tiam oni vidis ke li havis nenion en ĝi.

Lia kunulo intencis same grimpi; sed, per pli da ruzo aŭ da fortoj ol sia antaŭulo, sukcesis atingi la supraĵon kaj de tie li povis atente rigardi la mondon — malgrandan, tre malgrandetan! — kuŝantan sub siaj plandoj.

Kaj la mondo proklamis lin Geniulo.

III

Kaj daŭris pasante homoj kaj homoj kiuj, kiel tiu unua, haltis momenton por admiri la Geniulon, kaj ekkriis:

«Eble la frenezulo kiu falis estis tia Geniulo kia tiu ĉi... sed la sorto ne favoris lin.»

Tiuj ĉi estis *la inteligentuloj*.

Kaj, pasis pli multaj homoj kiaj la dua, kaj nek ion dirante nek haltante, ili sin komplezis pensante:

«Eble tiu ĉi kiu atingis la supraĵon estis tiel freneza kiel tiu kiu falis... sed favoris lin la sorto.»

Tiuj ĉi estis *la saĝaj personoj*.

Kaj pasis pli multaj homoj, — ho, multegaj pli! — kiuj, kiel la tria, daŭris en sia marŝado nenion pensante eĉ nek suspektinte la ekzistadon de la frenezulo, nek tiun de la Geniulo.

Kaj tiuj ĉi estis *la grandega plimulto*, kiuj nomas sin mem *preskaŭ ĉiuj*. — Kaj tiuj ĉi estas kiuj faras kaj malfaras ĉar la tero estas ilia.

APELES MESTRES

(kun afabla permeso de l' aŭtoro trad. E. PELLICER)



LA PATRA AMO

DE longe jam foriris la gajeco ĉe la metiisto. Jako, la ĝis nuna bonā kaj lerta lignisto, estas nun preskaŭ tutē ŝanĝita. La paco kiu regis en lia simpatia familio, dum la unuaj jaroj de lia edziĝo, estis anstataŭita de la malamo, de la malgajeco, de la malfeli-

ĉeco. Mario, la bela kaj ridema Mario, la iama karesema edzino, estas hodiaŭ nekonebla. Longaj kaj profundaj sulkoj aliformigis ŝian vizaĝon; ŝiaj okuloj perdis pro la larmoj la tiaman ĉarmon, kaj esprimon, kaj eĉ kiam por kaŝi siajn internajn suferojn ŝi intencis ekrideti, ŝia mieno malkovris la ĉagrenon kiu ŝian koron premis.

Familia malfeliĉaĵo estis la kialo de tiu grava ŝanĝo. La malgrandá Ludoĉjo, la unua frukto de ilia geedziĝo lasis en la atingo de sia tria jaro, la patran societeton por kuniĝi kun siaj similuloj la anĝeloj. La vundo kiu la geedzojn trafis estis fatala, tial ke la infaneto forkunportis, en sia forflugo, la gajecon de la hejmo.

Bedaŭrinde ne alvenis la bezonata konsolo por ambaŭ. Se la kompatinda Mario trovis en sia fido la kristanan rezignacion kiu centobligas ŝiajn malmultajn fortojn, la nekonsolebla Jako serĉis konsolon tien kie neniel povis ĝin trovi, kaj la ordema kaj bona edzo ĝis tiam, eniris kaj falis tute en la lernejon de la malvirto kiu al li liveris ne konsolon, sed forgeson por iliaj ĉagrenoj.

Ne taŭgis ke nova infano anstataŭis poste la ĉielirintan. La malfeliĉa Jako estis jam aliĝinta. La drinko eltiris lian bonfarenon kaj baris la lertecon de liaj fingroj kiuj ekstremis kiel tiuj de maljunula mano. Li perdis rapide sian antaŭan laboremon kaj finé post senutilaj admonoj de sia mastro, tiu ĉi lin eksigis.

De tiam la trinkejo estis la ordinara ejo de Jako, kaj *Karaĵo* — la mallaborema kaj drinkema *Karaĵo*, originala estaĵo kiu neniam faris utilan aferon — iĝis lia ofta kunulo kiu al li sciigis sian kutiman kanton:

Manĝi bone,
ne labori,
ĉiam trinki
Jen la viv'.

La sekvoj de tiu societo kaj de tia vivado ne sin atendigis multe. Mario kaj Jaĉjo, ŝia fileto, baldaŭ suferis ilin kaj la sankta hejmo rapide iĝis infero.

Mario rezignacie suferis sian malbonan sorton kaj per siaj korporej klopodoj gajnis la helpan monon por la unuaj bezonoj de la kompatinda familio de la mallaboremulo.

* * *

Tiel sekvis la aferoj en tiu hejmo post kelkaj jaroj. Nun la etulo multe kreskis kaj faras grandajn progresojn je sia instruo, kaj la heroo patrino por tio senĉese laboradis.

La tagon al kiu ni raportas nun, okazis la baptonoma festo de la paciencema Mario, sed se tio ĉi pasadis senaverte por la malvirtema edzo, kiu en tiu ĉi tago havis demonan humoron, la ĉarma infano ĝin rememoris bone.

La mallonga kaj malnutra tagmanĝo okazadis kun silento nur interrompita pro la senmotivaj fiparoloj de la furioza edzo minacante ante per siaj pugnoj la rezignaciitan Marion kiu mallevigante siajn palpebrojn maŝine ŝajnis porti al sia senapetinta buŝo la nutraĵon. La knabo kompatinde rigardis oblikve sian patrinon ne kuraĝante ekparoli vorton.

Iomete serenita la nuba hejma ĉielo kiam finiĝas la tagmanĝo, la malgranda Jaĉjo oportune profitis tiun okazon, saltante subite sur la seĝon kaj tiam, eltirante el sia poŝo, decide, prematan skribpaperon per kuraĝa kaj laŭta voĉo legis jene:

«Hodiaŭ, la baptonoma festo de mia estimata patrino, mi tutkore ŝin gratulas, dezirante milon da feliĉaĵoj por ŝi, por mia kara patro (la malfeliĉa Jako restis malkviete sur sia seĝo, mirigita, rigardante sian filon; Mario havis fiksitajn siajn okulojn al sia edzo), por la progreso de nia hejmo, sekvadis parolante Jaĉjo, kaj fine por ke venontan tagon mi povus danki, kiel ili meritas, la bonfarojn kiujn mi al miaj gepatroj ŝuldas, donante al ili trankvilan kaj ĝojoplenan maljunecon.» La mieno de Jako iĝis tute aliformita kaj du larmoj kiel du aveloj faladis malrapide sur liaj vangoj.

Kelkaj sekundoj okazis silente. Jako kaŝis per siaj du manoj sian vizaĝon. Mario karese metis dolĉe sian dekstran manon sur la ŝultron de sia edzo kaj direktinte la maldekstran al la infano, kiu kiel statuo restis sur la seĝo, tiel parolis: Rigardu, kara edzo, nian belan amon. Faru por li tion kion por mi neniam fari volis kaj por li, forpelu ĉiajn malvirtojn, laborante kaj returnante al nia senĉanca hejmo la perditan gajecon. Ĉirkaŭprenu lin kiu pli bonan sorton meritas. Tiu fileto, kiu nin lasis senkonsole, certe atestos cian bonan fakton.

Jes, ĉi estas prava Mario, diris decide Jako, mi estas krimulo, abomena estaĵo, levigante kaj malfermante siajn brakojn, venu ambaŭ al mia brusto, kien, pasinte de la diro al la fakto, li forte premadis Marion kaj Jaĉjon kisanter pasie ilian kapojn. Danku Dion kaj niajn anĝelojn, ekĝemis Mario, redonante la edzajn kisojn kaj ĉirkaŭprenojn.

La amaso de la tri personoj ŝajnis tiam skulptaĵon lumigitan per ero de Dia helo...

— Bonan tagon! — diris per raŭka voĉo *Karaĵo* kiu malfermante la pordon per malĝentila puŝo eniradis balanciĝante. Mario ekstremis kaj forte premis sian edzon. ★ ★ ★

— Bonfartu, — respondas ĝenita Jako.
Karajo rigardadis atente tian familian amason kaj fleksigante sian senforman korpon kaj ridaĉante ironie ekkriis :

— Jako, Jako, vi kortuŝadas min.

La infano ĉirkaŭpremis la patran kolon timante ke lia patro cedus. La vizaĝo de la edzino ŝajnis tiam tiu de ĵaluza leonino.

La mokata edzo sentas sangan alfluon al sia vizaĝo kaj montrante per la fingro la ĉambreliron, li diris kolere al la enirinta *Karajo* .

— Foriru malbona besto... foriru malproksimen. Mi deziras iĝi alia homo. De nun restos por vi fermata la pordo de mia domo.

Karajo direktis mokan rigardon al la parolinto kaj salutante lin komike, foriris malrapide kantante sian propran kanton :

Manĝi bone,
 ne labori,
 ĉiam trinki
 jen la viv'.

Pasis dek jaroj. Ĉe la granda laborejo de la mastro Jako estas festa tago. Oni solenigas kune du gajajn okazintaĵojn : la patronan daton de la mastrino Mario kaj la premion kiun gajnis studema Jaĉjo, kiu nun lernadas profite la inĝenierajn studojn. La sankta paco kaj ĝojo plenigis ĉie tiun ĉi feliĉan hejmon: Je tiu momento la juna studento adiaŭis apud la pordo de la ŝtuparo la laboristojn de la patra laborejo kiuj partoprenis en la ĵusokazinta festeno. La geedzoj restas solaj en la neluksa sed komforta manĝoĉambro.

— Ĉu vi estas feliĉa mia kara edzo? — diris Mario.

— Ne feliĉa, feliĉega, — respondis Jako.

— Kiel ŝanĝis la aferoj!

— Certe Manjo dankon al ciaz klopodoj.

— Ne Jako, dankon al niaj filoj, dankon al la patra amo.

Tiam oni aŭdas konatan kanton kiu venis de la strato.

La geedzoj tuj malfermas kune la balkonajn pordojn, kaj, ek montriĝante ekstere, povis elvidi malagrablan scenon.

La malfeliĉa *Karajo* maljuniĝinta, sin apogante per bastono kaj trenante siajn piedojn, persekutis la knabaron kiu mokas lin.

Malriĉa kaj senzorga, ĉar lia filo estas en malliberejo kaj lia filino rondiris la mondon lasante poste erojn el sia honoro, li estis sola.

La sensorta *Karajo* atendis ke la morto lin kaptu sur la strato, ian ajn nokton, kiel mizeran hundon.

J. M.^o TERRICABRES



ĈIELA PECO

Hodiaŭ mi eniris en la ĉambron de mia amatino. Ho! kiel bela ĝi estas! Kian odoron tiom ravantan en ĝi oni spiras! La balkono estis duonfermita, permesante ke en ĝin eniru freŝa aero.

Zorge, paŝante tre malrapide kaj eĉ ne spirante por ne fari bruon, mi, ekstazie, rigardadis ĉiujn mirindaĵojn kiujn ĝi enhavas. Mi ne bone scias kiel, mi genufleksiĝis kaj malkovris mian kapon kvazaŭ mi estus enirinta en preĝejon. Sed, jes, vere ĝi estas preĝejo, ĉar tie mia amatino preĝas la amon...!

La puntkuseneto staris sur seĝo, kun peceto da bela punto sur ĝi, farita per tiaj tiom delikataj manoj, kaj kun ĝiaj puntfariloj malaranĝitaj. Sur komodo staris du kruĉoj el bela fajanco plenigitaj da belaj kaj diverskoloraj floroj, kiuj samtempe staras antaŭ vitrameblo enhavanta statuon de Virgulino Mario. Kaj portreto de mi, kuŝis sur la meblo, apud la floroj.

Mi demetis tirkeston el la komodo (Dio pardonu al mi tion!) kaj en ĝi mi vidis la vestolaĵojn de ia festaj tagoj atentege gladitaj kaj fleksitaj. En malgranda bela kesteto, ŝi gardas miajn amemajn leterojn. Mi ekkomencis legi iujn el ili: «Amindega amatino mia», la unua diris, kaj la sekvanta «Mia koro»; kaj alia «Mia amata estonta edzino»... Ho!... Kiel mi ruĝiĝis!...

Aliflanke, mi vidis la liton ŝian, tiel belega, tiel blanka ke ĝi ŝajnis esti farita el lilioj, kaj dum mi rigardadis ĝin, mirigita, mi aŭdis kantadi najtingalon enfermitan en kaĝeto, kaj ĝiajn kantojn, jen kia strangeco!, mi komprenis. Li diris:

«Junulo: mi bone vin konas. La buŝeto kiu ĉiutage metas en tiun mian, la piniojn, ĉiam diras al mi ke ŝi vin amas. Jen mi ja vin konas!».

Kaj poste diantoj parolis:

«Fraŭlo: se vi scius kion al ni diras ĉiufoje kiam nin surverŝas via amatino!... Ho! Kiel ĝojega vi estus aŭdante tiajn belajn amvortojn!...»

Kaj la puntfariletoj respondis:

«Kiom da fojoj ni dancadas inter la manoj de via amatino dum ŝi kantas belajn kantojn! De tiuj kantoj, la sopiroj por vi, estas la respondkantoj.»

Kaj la kuseno el ŝia lito, balbutis:

«Kiam ekdormas ĉiunokte kaj matene kiam ŝi vekigas, ŝiaj lipoj el koralo malfermiĝas dirante vian nomon.»

La portreto tiam diris:

«Estas la nomo mia, kompreneble, ĉar preskaŭ ĉiam, mi estas inter ŝiaj manoj el smeraldo, kontraŭ ŝiaj ruĝaj lipoj per kiuj plenigas min je amkisoj.»

Kaj eĉ la Virgulino, ridetante, malfermis sian buŝon por diri:

«Kiam ŝi preĝas antaŭ mi, tre ofte haltas elparolante vian nomon. Jen, vi ja devas esti feliĉa!...»

Subite la plej alta dianto, kiu staris kvazaŭ viglisto, ekkriis: «Silentu ĉiuj: ŝi alvenas.»

Tiam la tuta ĉambro, ĝojega pro la enhavo de tia mirindeco, ektremis de feliĉo, dum la najtingalo, honorante ŝin, senĉese kantadis siajn plej belajn kantetojn...

Miaj amegaj lipoj sin kunigis kaj amkiŝo supren perdiĝis...

Peco el ĉielo, nesto el naiveco kaj Amo : via memoro pasigas dolĉe mian vivadon!...

JOHANO AUBEYZON LLOPIS



LA SPIONA INFANO

Li estis nomata Stenne, la malgranda Stenne, estis infano de Parizo, malfortika kaj pala kiu havis proksimume dek jarojn, eble kvin!

Lia patrino mortis. Lia patro, eksmarsoldato, gardis skvaron en la kvartalo de la Templo. La infanetoj, la vartistinoj, la maljunaj sinjorinoj kun faldseĝoj, la malriĉaj patrinoj kiuj venis en tiujn ĝardenetojn por serĉi ŝirmon kontraŭ venturiloj konis bone la patron Stenne kaj estimegis lin. Oni sciis ke, bona, kortuŝa preskaŭ patrino, rideto kaŝiĝis sub lia kruta lipharo, kaj por vidi tiun rideton estis nur necese diri : «Kiel fartas via knabeto?» Li tiom amis sian filon, la patro Stenne! Li estis tiom feliĉa post la klaso kiam la malgrandulo venis por serĉi lin kaj ambaŭ ĉirkaŭiris la aleojn, haltante antaŭ ia benko por saluti la kutimajn vizitantojn kaj respondi iliajn bonajn vortojn. Bedaŭrinde ĉio ŝanĝis dum la sieĝo. La skvaro de la patro Stenne estis fermita; oni metis tie petrolon kaj la mal-feliĉa homo, kiu estis devigata fari observon senĉese, vivis en la senhomaj boskoj, sola, nefumante, havante sian knabon nur vespere, tre malfrue, en la domo. Ankaŭ, lia liphararo estis terura kiam li parolis pri Prusoj! La malgranda Stenne ne plendis pri tiu nova vivo.

Sieĝo! Tio estas tiel amuza por la buboj! Ne plu lernejo, libertempo ĉiam kaj la strato estas kiel foira kampo. La infano restis ekstere ĝis vespero, kurante. Li akompanis kvartalajn batalionojn, kiuj iris al la remparo, elektante prefere tiujn, kiuj havis bonan muzikistaron.

Aliajn fojojn li rigardis la mobilizatojn kiuj ekzerciĝis. Plie li ŝatis laŭvice atendi antaŭ la pordoj de la vendejoj kun sia korbo sub sia brako. Li enŝovis sin en tiujn longajn vicojn kiuj formiĝis en la mallumo de la vintraj matenoj sen gaso antaŭ la pordo de buĉistoj kaj panistoj. Tie la piedoj en akvo, oni konatiĝis, oni parolis pri politiko. Sed la afero plej amuzanta estis la ludo nomita : korko. Kiam la malgranda Stenne ne estis apud la remparo, nek antaŭ la panbutikoj, vi lin certe povis trovi ĉe la korkludo en la placo de la Akvujego. Li ne ludis kompreneble, multe da mono li bezonus por tio. Li nur rigardis la ludantojn per grandaj, enviaj okuloj! Unu

ludanto precipe kiu estis blue vestita kaj kiu metis en la ludon nur kvinfrankajn monerojn ekcitis lian admiron. Kiam tiu ĉi kuris oni aŭdis la orajn monerojn kiuj sonoris en la fundo de lia poŝo. Foje relevante unu moneron kiu estis rulinta ĝis la piedoj de Steneĉjo, la Grandulo diris al li mallaŭte : «Ci deziregas tion, nu ! Se ci volas mi diros al ci kie oni trovas tion.» La ludon fininte li kondukis lin flanken kaj proponis al li ke li venu kun li por vendi ĵurnalojn al Prusoj. Oni ricevis tridek frankojn po unu vojaĝo. Komence Stenne rifuzis tre indigne kaj li restis tri tagojn ne reirinte al la ludo. Tri terurajn tagojn ! Li ne plu manĝis, li ne plu dormis. Nokte li vidis amasojn da korkoj starantaj apud sia lito kaj monerojn kvinfrankajn brilajn kiuj preterpasis. La tento estis tro forta. La kvaran tagon li reiris al la Akvujego kaj revidis la Grandulon ; li tuj estis delogata ! Ili foriris dum neĝmateno kun tolsako sur la ŝultro kaj ĵurnaloj kaŝitaj sub siaj kiteloj. Kiam ili alvenis al la pordo de Flandro, tagiĝis apenaŭ. La Grandulo ĉirkaŭprenis la manon de Stenne kaj proksimiĝante al la gardanto, bravulo kiu havis ruĝan nazon kaj bonan ŝajnon, li diris per voĉo de malriculo : «Permesu nin pasi, mia bona sinjoro ; nia patrino estas malsana, paĉjo mortis. Mi iras kun mia frateto por kolekti terpomojn en la kampo.» Li ploris.

Stenne honte mallevis la kapon. La gardostaranto rigardis ilin dum momento, fets rapidan rigardon al la senhoma kaj blanka strato. «Pasu rapide», li diris al ali, flankiĝante, kaj jen ili sur la vojo de Aubervilliers. Estas la grandulo kiu ridis ! Konfuze kiel en songo Steneĉjo vidis fabrikejojn aliformigitajn en soldatejoj, senhomajn barikadojn garnitajn per malsekaj ĉifonoj, longajn kamentubojn kiuj penetris la nebulojn kaj malplenajn, breĉigitajn supreniris al la ĉielo.

De loko al loko li vidis unu gardstaranton ; oficirojn enkapuĉitajn, kiuj rigardis tie per lorneto, kaj malgrandajn tendojn starantajn sur fluidiĝinta neĝo antaŭ mortintaj fajroj. La Grandulo konis la vojojn, li iris trakampe por eviti la postenojn. Tamen ili alvenis, ne povante fari alie al posteno de *francs-tireurs* (liberaj pafistoj). La *francs-tireurs* estis tie kun siaj malgrandaj kapuĉmanteloj, kaŭrantaj en la fundo de plenakvafoŝaĵo. Tiu foje la Grandulo rediris sian historion vane, oni ne volis ke ili pasu ; tiam, dum li plorĝemadis, maljuna serĝento tute blanka, tute sulkoplena kaj kiu similis la patron Stenne eliris el la domo de la barilgardisto. «Nu ! infanetoj, ne ploru plu, — li diris, — oni permesos vin iri por serĉi viajn terpomojn, sed antaŭe eniru por varmigi vin iom, tiu bubo ŝajnas tute frostita.» Vel Ne estis pro malvarmo ke la malgranda Stenne tremis, estis pro honto. En la posteno ili trovis kelkajn soldatojn kaŭrantajn ĉirkaŭ maldika fajro. Per la varmo de tiu fajro ili degeligiĝis biskvitojn sur la ekstremaĵo de siaj bajonetoj. Oni densigiĝis la liniojn por fari lokon por la infanoj. Oni donis al ili iom da kafo. Dum ili trinkis, ia oficiro venis sur la sojlon, vokis la serĝenton parolis al li mallaŭte kaj toriris rapide. «Kunuloj ! — diris la serĝento reenirante ĝojradia, — oni batalos hodiaŭ nokte. Oni aŭdis okaze la *vorton* de la Prusoj. Mi kredas ke tiufoje ni reprenos *le Bourget*.» Estis eksplodo de

aplaŭdoj kaj de ridoj. Oni dancis, oni kantis, oni purigis la bajonetojn kaj profitante tiun tumulton la infanoj malaperis.

Ili aliris al muro haltante ĉiupaŝe por similigi kolektadon de terpomoj «Reeniru ni... ne iru ni tien», diris senĉese la malgranda Stenne. La alia levis la ŝultrojn kaj ĉiam antaŭeniris.

Subite ili aŭdis la pafpretigon de pafilo kiun oni streĉis. «Kusĝu», diris la Grandulo sin jetante teren. Poste li fajfis, alia fajfo respondis. Ili antaŭeniris rampante. Antaŭ la muro aperis du flavaj lipharoj sub malpura platĉapo. La grandulo saltis en la sulkon apud la Pruso. «Estas mia frato», li diris montrante sian kunulon. Stenne estis tiel malgranda ke, vidante lin, la Pruso ekridis kaj devis preni lin en siajn brakojn por lin pasigi trans la muro. Baldaŭ, la infanoj alvenis al domo. La teretaĝo estis plena je germanaj soldatoj kiuj ludis per ludkartoj kaj faris la supon sur granda brila tajro. Kiel tiu supo bonodoris je brasiko kaj lardo!! Kia diferenco inter la supo de la *Francs-tireurs*!

La oficiroj loĝis en la unua etaĝo. Oni aŭdis ke ili ludas fortepianon kaj malŝtopis la botelojn de ĉampanvino. Kiam la Parizanoj eniris, ili estis salutataj hure pro ĝojo. Ili donis siajn ĵurnalojn, poste oni verŝis ion por trinki kaj oni babiladigis ilin.

Ĉiuj oficiroj ŝajnis fieraj kaj malbonkoraj sed la Grandulo amuzegis ilin per sia urba vervo kaj sia ŝtrabuba vortareto. Ili ridis kaj ripetis liajn vortojn post li. La malgranda Stenne estus bonvolanta paroli ankaŭ sed iu ĝenis lin; kontraŭ li staris Pruso pli aĝa, pli serioza ol la aliaj, kiu legis, aŭ pli bone, kiu ŝajnis legi ĉar liaj okuloj ne forlasis lin.

En tiu rigardo estis amemo kaj riproĉoj tute kvazaŭ tiu homo havus en sia lando infanon samaĝan kiel Stenne kaj ke li diris al li interne. «Mi preferus morti ol vidi ke mia infano faras tian metion.» De tiu tempo ŝajnis al Steneĝo kvazaŭ mano premas lian koron kaj malhelpas ĝian batadon. Por forigi tiun premdoloron li ekdrinkis. Baldaŭ ĉio turniĝis ĉirkaŭ li. Li aŭdis konfuze inter ridegoj sian kunulon kiu mokis «naciajn gardojn» (*gardes nationaux*). Poste la Grandulo ekparolis mallaŭte kaj la vizaĝoj fariĝis seriozaj. Tiufoje Steneĝo starigis furioza tute elebriigita. «Ne, tion, Grandulo, mi ne volas.» La alia ridis kaj daŭrigis. La oficiroj tuj ekstarigis, unu el ili montris la pordon al la infanoj «Eliraĉu» kaj la oficiroj ekparolis kune tre rapide germane. La Grandulo eliris kiel dogo, sonigante sian monon. Stenne sekvis lin mallevente la kapon, kaj kiam li pasis proksime la Pruson kies rigardo tiom estis embarasinta lin, li aŭdis malgajan voĉon kiu diris: *Bas choli ĉa!*¹ (Tio ne estas bela!). Larmoj aperis en liaj okuloj. Kiam la infanoj estis en ebenaĝo, ili ekkuris kaj reiris rapide. Ilia sako estis plena je terpomoj kiujn la Prusoj estis donintaj al ili. Pro tio ili pasis facile antaŭ la *Francs-tireurs*. Tiuj ĉi preparis sin por la nokta atako: soldataroj alvenis silente, amasiĝante post la muroj. La maljuna serĝento

1) *Bas choli* (elparolu ba ŝoli') signifas france *Pas joli* kaj estas skribite laŭ la elparolmaniero de la prusoj.

estis tie okupita, lokante siajn soldatojn. Li ŝajnis feliĉa. Kiam la infanoj alproksimiĝis, li rekonis ilin kaj sendis al ili bonan rideton. Ho! kiel tiu rideto faris doloron al la malgranda Stenne. Momente li volis krii: «Ne iru tien, ni perdis vin.» Sed la alia estis dirinta: «Se ci parolas, ni estos pafmortigataj.» Kaj li silentis pro timo.

Alvenante je la *Courneuve* ili eniris en forlasitan domon por dividi la monon. La divido estis farata honeste kaj aŭdante la belajn monerojn kiuj sonoris sub lia kitelo, pensante pri la korkludoj estontaj, la malgranda Stenne ne plu juĝis sian krimon tiel malbelega. Sed kiam li estis sola, la malfeliĉa infano!, kiam enirinte en la urban pordon la Grandulo forlasis lin, liaj poŝoj fariĝis pezaj kaj la mano kiu premis lian koron ankoraŭ premis ĝin pli forte. Parizo ne ŝajnis plu la sama urbo de antaŭe. La personoj kiuj pasis, ŝajnis rigardi lin severe kvazaŭ ili estis sciintaj de kie li venis. La vorton *spionanto* li aŭdis en la bruo de la radoj, en la batado de la tamburoj. Fine li alvenis ĉe li kaj li estis tre feliĉa vidi ke lia avo ne estis ankoraŭ reirinta. Li supreniris rapide en la dormoĉambbron por kaŝi sub sia kapkuseno tiujn monerojn kiuj tiel pezis al li.

Neniam patro Stenne estis tiel bona, tiel gaja kiel en tiu ĉi vespero. Oni ĵus estis ricevinta bonajn novaĵojn de la provinco.

Mangante, la maljuna soldato rigardis sian pafilon pendigitan sur la muro, kaj li diris al la infano kun bona rido: «He! infano! Kiel rapide ci irus al la Prusoj se ci estus granda!» Proksimume je la oka oni aŭdis la kanonon, «Ĝi estas Aubervilliers, onj batalas al *Bourget*», diris la patro kiu konis ĉiujn fortifikaĵojn.

La malgranda Stenne fariĝis pala kaj pretekste ke li estis lacega, li kuŝiĝis sed ne dormis. La kanono ankoraŭ tondris. Li imagis la *Francs-tireurs* kiuj alvenis nokte por ataki ne atendinte kaj kiuj falis en embuskon. Li memoris la serĝenton kiu estis ridinta je li.

Li vidis lin kuŝantan, tie, en la neĝo kaj multe da aliaj kun li. La prezo de tiu sango kaŝiĝis sub lia kapkuseno kaj estis li, la filo de sinjoro Stenne, de soldato...

Larmoj sufokis lin.

En la ĉambro apuda, li aŭdis sian patron kiu marŝis, kiu malfermis la fenestron.

Sur la placo, bataliono de mobilizatoj estis preta por foriri. Efektive estis vera batalado.

La malfeliĉuleto ne povis haltigi plorĝemon. «Kion do ci havas?», diris la patro Stenne enirante. La infano ne plu povis konservi sian sekreton. Li saltis el la lito kaj ĵetis sin al la piedoj de sia patro. Pro tiu movo la moneroj rulis teren. «Kio estas tio?», diris la maljunulo tremante. Tiam, senhalte, Steneĵo rakontis ke li estis irinta ĉe la Prusoj kaj kion li estis farinta tie.

Laŭ tio ke li parolis li sentis sian koron pli libera, tio kvietigis lin. La patro Stenne aŭskultis kun terura vizaĝo, Kiam estis fininta li kaŝis sian kapon en siajn manojn kaj ploris. La infano provis paroli: «Patro! Patro!»,



sed la maljunulo forpuŝis lin ne respondante kaj relevis la monon. «Ĉu estas ĉio?», li demandis. Steneĉjo faris jesan signon. La maljunulo mal-kroĉis sian pafilon, sian kartoĉujon kaj metante la monon en sian poŝon li diris: «Estas bone, mi iras por redoni ĝin al ili.» Kaj ne aldonante unu vorton li malsupreniris kaj enŝovis sin inter la mobilizatoj kiuj foriris en la nokto.

De tiu tempo neniam oni vidis lin!

El «Lundaj Rakontoj», de ALPH. DAUDET
Tradukis: BENJAMINE KAJ YVONNE MIGNON



NOVEMBRO

Jam alvenis aŭtuno; jam venis tiu ĉi melankolia sezono kiu senfoliigas la arbojn, kaj trapasas la tergloblo io kvazaŭ senfruktiga bloveto ĉion sekiganta. Jam alvenis la tagoj rememorigantaj nekonitajn malgajaĵojn, la tagoj malegalaj de la barometraj balanciĝoj, tiuj de flavaj krepuskoj...

Jam la suno el ĝia flameljeta ĉaro direktas la lastajn kaj maloftajn rigardojn sur la mortigantan Naturon...

Jam levigas la nebulo lasante en la branĉplenaj arboj pecoj da sia flir-tanta gaso; la melankolia lumo de l' vintra krepusko proksimiĝas rapide, kaj la nigra silueto de la Morto avidege aperas, sendante siajn mortigajn ehojn sur la florojn, bestojn kaj kreskaĵojn.

La vivo fermas siajn okulojn kiam sin sentas vundita de la novembra ventblovado, kaj restas silenta kaj dormiĝanta.

Ornamiĝas la montoj per blankaj tavoloj el neĝo, le verdeco de l' kam-poj pereas, la aŭtunaj floroj velkas kaj la birdoj ĉesigas siajn belajn kaj amajn kantaĵojn.

Jam oni ne aŭdas la murmuradon de l' rivereto; ĉio estas envolvita en la mistero, nur resonas la brueto kaŭzita de la sekaj arabaj folioj falantaj sur la malvarman teron kaj similantaj larmoj de l' Naturo.

Tiel estas la Novembra monato ĉe nia klimato. Krepuska vetero, ves-pera, inter la bela tago de l' somero kaj la malgaja nokto de l' vintro. Mo-nato vere funebra kaj mallumega. Ĝi komenciĝas per tiuj tagoj de animoj en kiuj ĉiuj turnas la rigardon posten por vidi en la vojo de la pasinta tempo la vicon da amataj ombroj kiuj laciĝis vivi, kaj finiĝas, penetrante la malvarmon eĉ en la poŝojn.

Persistega konkuranto de Majo kies floran produktadon ĝi detruas per sia mortiga kiso.

Mi timas ĝin kaj ekstremaĵojn...

Mi foriras... Tien... Funden...

ARTURO TORNÉ



ANEKDOTO

Viro preterkuras antaŭ Sokrato persekutante iun kaj kriegante :

— Kaptu lin! Kaptu lin!

La instruanto de Platono restas senmove.

— Ĉu vi estas surda? Kial vi ne haltigis la mortiginton?

— Mortiginto? Kio estas mortiginto, laŭ via opinio?

— Nu, kia demando! Mortiginto estas homo, kiu mortigis!

— Buĉisto, do.

— Ĉu vi estas freneza? Homo, kiu mortigis... alian homon.

— Ha, mi komprenas! Soldato.

— Ignoranto! Homo, kiu mortigis iun dum paca tempo.

— Do, mi ja, scias. Ekzekutisto.

— Idioto! Homo, kiu mortigis iun ĉe li.

— Mi komprenas!... Kuracisto.

Ĉi tion aŭdinte, la alparolanto ne insistas plu kaj foriras malbenante Sokraton.

A. NOVEJARQUE



PROFESORO DRO. SIEGFRIED LEDERER

L'esperantisme, en cosa d'un any, ha sofert greus perdues en les seves rengleres; i han sigut, els buits que han quedat, d'aquells difícils d'omplir.

Ad els noms de Meray, Foerster, Berthelot, J. W. van der Val, Serdà, Muixí, i altres, avui hem d'afegir-hi el prestigiós de Lederer, mort el dia 8 del prop-passat Setembre.

Vegi-s com ne fa la biografia el nostre comfrare *Germana Esperantisto*, que es qui toca més de prop la perdua d'aquest cap davanter de la nostra causa.

«El professor Dr. Lederer va néixer, el 30 de Juny de 1861, a Prag. Va estudiar la filologia classica, i s va llicenciar de professor a la seva ciutat natal; carrec que ha vingut desempenyant fins a la seva mort.

Apart d'això, era director científic de la *Prager Deutsche Urania* i redactor del *Stereoskopisches Museum*. Feia molts anys que s'ocupava de llengües modernes : a la coneguda «Biblioteca Universal de Reclam», avia publicat diferents traduccions (Castelnuova, Neera, Marc Monnier, etc., etc.)

També, com escriptor original, avia publicat algunes interessants obres, amb bastant d'èxit.

○ Emperò feia més de vint anys que venia dedicant-se a les llengües artificials. Ell fou un dels primers *volapükistes*, i edità durant quatre anys (1889-1892), en alemany i volapük, la revista *Zi vol lölik* (*Al voltant del món*), la qual havia assolit el nombre de quatre mil subscriptors. Apart d'algunes obres referents al volapük, avia publicat també algunes traduccions en aquesta llengua, entre elles la de la gran obra del príncep austriac Rodolf *Eine Orientreise*. Emperò, veient que 'l volapük no tenia èxit, va deixar les llengües artificials i col·laborà, per indicació del ministre d'Instrucció pública d'Àustria, en el gran diccionari *Thesaurus linguae latinae*, el qual durant molts anys va absorbir totes les seves energies.

Després de complert tant gran treball, estudià l'Esperanto, i desseguida es convencé, com ell deia, que la genial creació de Zamenhof obtindria lo que 'l volapük no conseguí. Per això ell se decidí, amb totes les seves forces i la seva experiència, guanyada durant un feix d'anys, a la propaganda i evolució de l'Esperanto. Això 'u féu amb una gran persistència, i molts són els fruits del seu treball per a la nostra llengua. Féu discursos, fundà societats esperantistes, i, sobre tot, la seva ploma sempre va estar disposta a favor de l'Esperanto. Va treballar en el *Diccionari alemany-esperanto* i en el *Diccionari científic esperantista*. A més, traduï de la llengua danesa l'obra d'Andersen *Bildolibro sen bildoj*, que després edità. La seva última obra es *Sufero*, de Carmen Sylva, que, traduïda desde l'original alemany, publicà junt amb sis altres traduccions en diverses llengües fetes de la seva traducció esperanto.

Desde 'l començament de l'any 1909 col·laborà a la revista *Universo*, i pel Novembre del mateix any va fundar, junt amb el Dr. A. Schram, de Dresde, la revista alemanya-esperantista *Rund um die Welt* (*Al voltant del món*), la qual es molt agradable com instrument de propaganda.

Molt treball ha dedicat, principalment, a traduccions desde diverses llengües a l'Esperanto, les quals publicava a la secció *Esperanto kiel interpretilo*.

Altre gran treball portà a cap, durant els dos ultims anys, en la confecció i redacció de l'*Esperantista Poŝkalendaro*, esforçant-se sempre en que 'l contingut fos interessant i fidel.

Actualment ja no existeix aquest home que féu a l'esperantisme inoblidables serveis. La seva última i gran idea fou la creació d'un fons monetari de 100.000 marcs per a la propaganda de l'Esperanto a Alemanya...»

Rebin els nostres companys de causa alemanys, i l'esperantisme en general, les nostres més sinceres condolences.



ENLANDA MOVADO

BARCELONO

Jurnala propagando. — Rekomencinte la tagon 21^{an} de Septembro, *La Publicidad*, denove enhavas ĉiujfaŭde Esperantan fakon. En la granda ĉiutaga ĵurnalo el Barcelono, *Las Noticias*, aperis ses artikoloj, pri la *Sepa*, verkitaj de Delfi Dalmau, kiuj estis gravaj propagandiloj por nia kara celo. La numeroj de *Las Noticias* enhavantaj tiujn artikolojn estas la datitaj 22^a kaj 25^a Aŭgusto kaj 3^a, 7^a, 16^a kaj 25^a Septembro. Ankaŭ publikigis samspecajn artikolojn *El Poble Català*, *La Actualidad* kaj *Diario del Comercio*, kiujn verkis J. B. M. (Jacinte Bremón Masgrau).

Ĉu ne estus bone ke vi ĉiuj, karaj gesamideanoj, sendu, tia okaze, leteron aŭ poŝtkarton al la respektiva direkcio de tiuj ĵurnaloj, dirante, por ekzemplo, ke ĉar Esperanto estas hodiaŭ tre interese, vi esperas ke tia ĵurnalo ofte publikigos Esperantajn notojn kaj informojn kaj ke en tiu espero vi restas al la ĵurnalo tre dankema pro la ĵus publikigitaj tiaj informoj, sciigojn, notoj aŭ artikoloj? Do, faru tion ĉiam!

Ekskursoj. — La 3^{an} Septembro, la grupo «Supren!» okazigis ekskurson, kiu vere sukcesis la pitoreska kaj historia kastelo d'Aramprunyà.

La sama grupo organizis alian ekskurson al kastelo de Sant Pere, kie ili lokis memorajon. Tiu ĉi estis, por solenigi la duan datrevenon de la «Kvina» kaj tial kelkaj geekskursanoj faris paroladojn. Ili revenis Barcelonon kun vera kontento pro sia ĵusa altcela, kaj amuza ago.

Festŭo ĉe «Barcelona Stelo». — La ĵus pasintan 16^{an} okazigis tiu grupo, belan feston kiel inauguracion de bela nova Flago. Tre bonè Esperante ornamita estis la granda salono, kie ĝi havis lokon kaj tre multe ĝi estis ĉeestata.

Legis poeziojn aŭ ludis fortepiane gefraŭloj J. Rey, M. Reig, D. Sulé, A. Delclos, M. Rey, R. Cortés, N. Reig, A. Cruz, J. Delclós kaj C. Puig. Oni alligis sur la flagon, bele broditan banton donacitan de Fino. Marina Reig. Sro. J. Gili legis dankan paroladon, kaj Sro. J. Grau eldiris elokventan paroladon, pri la simboleco de la flago, en Esperanto, kaj en Kataluna lingvo li faris konvinkan paroladon pri nia kara afero. Ĉiuj gepartoprenintoj estis ege aplaŭdataj.

Tiu ĉarma festo finiĝis per granda balo kiu multe amuzis la gefraŭlojn.

Projekto. — La 29^{an} Septembro kunvenis ĉe «Semo» (Ateneu Enciclopedic Popular) gesamideanoj kelkaj.

Nombre pli-malpli 30 ili kunsidis kaj laboris fruktodone, kaj tiel ili laboris ĉar ili ĉiuj estis sufiĉe fortaj venki ĉian individualismon — i aĝesta forĉa ja savem tots lo miraculosa que es entre 'ls catalans. — Ĉio estis interkonsentata unuanime. Tial la entuziasmo fariĝis plena konvinkigo pri la sukceso de granda projekto.

Jen, do, kiel bona estis la komenco, la unua paŝo. la plej malfacila paŝo! Nur mankas, nun, konstanta bonvolo por trairi la vojeton, kaj, ĉar jam estas vidata bonegaĵo ĉe la fino, tia vidaĵo ja havigos ĉiam pli intensa la konstantan bonvolon.

Unuiĝo. — Niaj gesamideanoj en la kvartalo Barceloneta grupiĝis ĉiuj en apartan solan grupon Esperantistan. — Bona ekzemplo!

Ili jam anoncas propagandan spektaklon kiel inaŭguracion. — Ĉiam antaŭen!

Novaj kursoj. — La grupoj «La Rondo», «Supren!», «Barcelona Stelo», «Verda Studejo», «Semo», «Geesperantistaro», k. a. jam komencis novajn kursojn de nia kara internacia lingvo, kiuj estas tre ĉeestataj.

Bona propagando. — La konstante laboranta grupo «Semo» de l'«Ateneu Enciclopedic Popular» (strato Carme, 30), eldonigis foliojn enhavantajn la opiniojn favorajn pri nia afero, de la eminentuloj Francisco Pi i Margall, Elisée Réclus, Tolstoj, Max Müller kaj Grafo Hayashi, en kastila lingvo.

Ni kore rekomendas la disdonadon de tiuj folioj. — *La Delegito.*

Espero Kataluna. — Tiu ĉi societo inaŭguraciis siajn esperantajn vendredojn per sercio de paroladoj pri la 7^a.

Sro. Bremón klarigis en du paroladoj al multenombra ĉeestantaro, la vojaĝon de la kataluna karavano al Antverpeno, kaj raportis tre detale pri la aktoj okazintaj dum la esperanta semajno en la urbo de la sepa.

Sro. Urbez (la trafa ludinto de Patro Knap) parolis pri la muzeoj de Belgujo kaj Holandujo, skizante la vivon kaj verkojn de la ĉefaj pentristoj de la flandra skolo, Rubens kaj Rembrant.

Sro. Sabadell priparolis la temon *Ekskurso tra Holandujo kaj vojaĝo al insulo Marken*. Ĉiu estis tre aplaŭdita, kaj la ĉeestintoj al la 7^a ĝoje rememoris okaze de tiuj paroladoj, la agrablajn momentojn pasigitajn en tiuj Nordaj Landoj.

TARRAGONA

En tiu ĉi urbo ekkomencas flori la semo de nia II^a Kongreso, ĉar Esperanto vekis grandan intereson inter la tarragonanoj, kiuj ĉiutage pretiĝas enskribis en la nomaron de niaj kunbatalantoj kaj deziras lerni nian internacian lingvon.

La tiea grupo aranĝas aktivan agadon por Esperanto en la ĉirkaŭaj vilaĝoj pere propagandaj ekskursoj, konferencoj, gazetartikoloj, k. t. p.

«Tarragono Esperanta» malfermis la 1^{an} de Oktobro du novajn kursojn klarigitajn de nia samideano Sro. Daniel Roig.

TERRASSA

Ĉe la societo «Casino del Comercio» okazis granda festo okaze la malfermo de la novaj esperantaj kursoj organizitaj de «Lumon».

Post la malferma parolado de la prezidanto de «Lumon» kiu gratulis al la multenombra ĉeestantaro pro ĝia ĉeesto, parolis Sroj. Lluís Martí, Martí Peig, Marian Solà, Josep Girona, Santandreu, Garriga, Fino: Gertrudis Cantarell, Joan Camps, Albert Oliart, Josep Casanova kaj nia senlaca amiko Delfi Dalmau.

Fine estis ludita la komedieto *Esperanto Praktika*.

SABADELL

La societoj «Lumon», el Terrasa, «Katolika Stelo», «Esperanta Semo» kaj «Aplec Esperanta Grupo», el Sabadell, invitis ĉiujn aliajn societojn esperantajn de la Valles'a regiono (comarca del Vallès) por la organizo de granda festo kiu okazos en la kamparo. La delegitoj de ĉi tiuj societoj kunvenis en Sabadell la tagon 29^{an} Oktobro por difini la daton kaj lokon en kiuj okazos la nomita festo. — *La Delegito*.

VILANOVA I GELTRU

La enketo kiu okazis inter la geanoj de nia societo dum la pasinta monato estis sukcesplena. Kvindek tri devizoj estis prezentitaj al la juĝantaro kiu decidis doni la unuan premion al la devizo

«Laboru esperante
Esperu laborante»

kiu de nun estos la devizo de nia grupo «Laboro Esperanta».

La juĝantaro tre kuraĝigis la premiitojn pro sia laboro kaj dankis al ĉiuj pro la klopodo de nia agado.

La 1^{an} de Oktobro oni ekkomencis novajn kursojn ĉe la societo «Ateneo». — *La Delegito*.

MANLLEU

La grupo «Esperantista Amikeco» varbas multe de esperantistoj, ĉar ni ĵus finis kurson per kiu oni esperantigis dekok junulojn, kaj tuje ekkomencis alian en kiu ĉeestas dudek ses lernantoj.

La nombro de kun societanoj altiĝis ĝis sepdek ok. — *E. A.*

SANT FELIU DE GUIXOLS

La Esperanta Societo «Fraterco» elektis la jenan novan komitaton:

Prezidanto, Sro. Pere Campistol; Vic-prezidanto, Sro. Joaquim Casanovas; Sekretario, Sro. Josep Blanch Vendrell; Vic-sekretario, Sro. Narcís Soler; Kasisto, Sro. Rosendo Reixach; Voĉ-donantoj, Sroj. Tomàs Torruella kaj Joan Cots kaj Finoj. Dolors Garbera kaj Dolors Vilaseca.

Ankaŭ tiu Societo malfermis Esperantan kurson la 1^{an} de tiu ĉi monato.

La sama Societo gratulis, per telegramo, al la Ministro de Publika Instruado pro la Reĝa Dekreto kiu permesas la Esperantan instruadon en publikaj Lernejoj. — *La Delegito*.



PALAFRUGELL. — II^a. GERONPROVINCA ASAMBLEO
GRUPOJ DE JUNAJ SAMIDEANOJ

PALAFRUGELL

En tiu ĉi urbo okazis en la tagoj 13-14^a Aŭgusto la II^a Geronprovinca Asambleo.

En ĝi partoprenis samideanoj el Girona, La Escala, Banyoles, Sant Feliu de Guixols, Santa Coloma de Farnés, kaj aliaj.

Krom la labora kunveno okazis teatra reprezentado de *Georgo Dandin* kaj *Pipamanto*, de nia kara amiko Pujulá, vizito al diversaj fabrikoj el la urbo, oficiala festeno, ekskurso al la marbordoj Llafranc kaj balo.

La entuziasmo vekita en ĉiuj estis granda, kaj la propagando por nia afero sukcesplena. — *La Delegito.*

VENDRELL

Dum la monato Aŭgusto okazis propaganda ekskurso al Vilanova i Geltrú por viziti la tieajn gesamideanojn kiuj nin akceptis korege.

Kune ni vizitis la sidejojn de la societoj «Orfeo» kaj «Ateneo» en kies salonoj nia samideano Sro. Escofet paroladis pri Esperanto. Multe plaĉis al ni la sidejoj de la nomitaj societoj ĉar ili montras al la vizitantoj ke en ili loĝas veraj kulturamantoj.

La grupo «Laboro Esperanta» nin regalis per luksa festeno, kaj en la fino oni kantis nian belan himnon *La Espero*.

En kunveno ĝenerala estis nomita la nova komitato de la grupo «Frateco» jene: Prezidanto, Salvador Urpi; Sekretario, Salvador Martorell; Kasisto, Salvador Gual; Voĉdonantoj, Anton Aymerich kaj Josep M.^a Gálvez. — *La Delegito.*

OLOTO

La tagon 27^a de Aŭgusto okazis festeno pro la adiaŭo al nia karega amiko Sro. Josep Pi, kiu estis devigata vojaĝi al Germanujo.

La foriro de nia senlaca amiko ĉagrenis nin tiel, ke dum kelkaj tagoj estis la temo devigata de niaj konversacioj, ĉar ni devas rememori, ke Sro. Pi, ĉiam estis preta por propagandi nian aferon, ne nur morale sed ankaŭ materiale.

Dum la festeno regis la gajeco kaj spriteco propraj de ĉi tiuj okazoj, kaj post la toastoj de kelkaj kunmangantoj, parolis nia amiko kiu per kortuŝantaj vortoj dankis la nemerititan honoron, kaj rekomendis al ĉiuj ke neniam lasu nian aferon, ĉar ĝi estas sankta.

Ni tutkore deziras al li la necesan bonfarton kaj ŝancon por venki en sia entrepreno en la germana lando.

Dum la ĉefa festo de nia urbo, vizitis nian sidejon kelkaj samideanoj el Vic, Banyoles kaj Girona, kaj pro tio oni organizis festeton en kiu partoprenis Fino. Pratdesaba, el Vic, rekomendante al ĉiu la ĉeesto al la III^a Kongreso de K. E. F., kiu okazos en tiu urbo.



DIVERSAJ NOTOJ

ALIA URBO ESPERANTIGITA

Al ĉiuj Esperantistoj kiuj deziras ian ajn informon pri urbo Tacoma au ĝia ĉirkaŭaĵo nia komerca klubo estas nun preta respondi en Esperanto. Ni esperas ke ĉiuj interesataj prenos ĉi tiun okazon por informigi sin pri la vasta kaj mirinda Okcidento. La Okcidento estas la estonta lando; Washington estas la ŝtato de promeso, kaj senhezite ni povas rekomendi Tacoma, kiel la plej belegan kaj la plej allogan urbon en nia ŝtato. Ĝi estas moderna urbo kun pli ol 100,000 loĝantoj. Ĝia alloga ĉirkaŭaĵo, ĝia milda klimato, ĝia beleco kaj pureco igas ĝin ideala urbo por la hejmsercanto. Ke tio estas fakto atestas la ĉeesto en nia urbo de multe da progresemaj alilanduloj. Skribu hodiaŭ al «Commercial Club», Tacoma, Washington, U. S. A.

ESPERANTO EN LA OFICIALAJ LERNEJOJ DE HISPANUJO

Por ke la homoj kiuj diras ke Esperanto ne triumfos ĝis kiam la registaroj oficiale metas ĝin en la unuagradon kaj sekve al Universitatoj, Gimnazioj, Normalaj Lernejoj, k. t. p. ekkontentiĝu, ni ĉerpas paragrafon el *Gaceta de Madrid* (15^a Aŭgusto).

«La oficiala enkonduko de tiu instruado estus tro frua; sed ne vidas la konsilantaro malfacilaĵon kontraŭstaran, por ke oni permesu la klarigadon de kursoj de tiu lingvo ĉe la oficialaj instruadaj institucioj per profesoroj montritaj de la esperantistaj societoj, kaj por ke oni konstatiĝu kiel oficialan meriton, diplomon pro sukceso ĉe ĝia lernado.

Tia permeso estas donota de la respondaj Rektoroj, al kiuj oni submetos la proponon pri profesoro.»

LETERO AL ĈIUJ INSTRUANTOJ DE ESPERANTO!

Preskaŭ ĉiu instruanto de nia lingvo bedaŭrinde spertas, ke je la fino de la kursa instruado nur restas malgranda nombro da gefervoruloj. La aliaj forlasas la lernadon tuj post apero de eĉ malgrandaj malfacilaĵoj. Ke ĉi tiu fakto ne estas bona propagandilo por ni, ĉiu devas atesti! La foririntoj kompreneble ne kulpigas sin mem, aŭ siajn proprajn malpaciencon kaj senkapablon, sed — ili riproĉas al nia ligvo malfacilegecon, eĉ maltaŭgon: Tio prokrastas kaj malhelpas la disvastigadon de Esperanto. Ĉi tiu plendinda vero postulas tujan kontraŭlaboron.

La unua devo estas. esplori la kaŭzon de la danĝera malbono. Jen — mia opinio, eble jam ofte dirita de aliaj samideanoj, sed ĉiam insiste repetinda.

La multenombro ne scias sufiĉe bone la gramatikan regularon de la gepatra lingvo. Pro tio ili ne ekkaptas la klarigojn donitajn de la instruanto. Ili ne povas ekzerci kaj lerni per nacilingvaj ekzemploj, ĉar ili ne konas la esencon de la rilata lingva regularo.

Estas konata fakto, ke ĝenerale dum la lerneja tempo nur escepte la fako «Gramatiko» estas ŝatata de la lernantoj. Tio kaŭzas domaĝon al la plenaĝa homo. Dum la ordinara ĉiutaga vivo li eble ne rimarkas tiel grave la efikon de la iama malatenteco, sed kiam li intencas lerni fremdan lingvon, la juneca peko ĝenas multe la bonvolon.

Malgraŭ Esperanto estas multe pli facile lernebla ol ia nacia lingvo, ĝi tamen postulas laboron kaj bonvolan fervoron. Pro tio mi proponas al la instruantoj aŭ instruistoj, kaj ankaŭ al ĉiuj gelernantoj, ke ili, antaŭ la komenco de la esperanta instruado ekzameni kaj ripetu la regularon de sia gepatra lingvo. Oni ja bezonas sian gepatran lingvon pro elekto de ekzemploj, por ekzercado. Sekve — oni devas atentigi la gelernantaron pri la nepra graveco de la pritraktita fakto.

Mi certe kredas, ke la akcepto de la propono. ekzameni kaj perfektigi la partoprenantojn de esperantaj kursoj en la rilata gepatra lingvo je la instruada komenco, aŭ je komenco de ĉiu leciono, garantios plej intensan sukceson. Mi signifas tiun ĉi fakton kiel tre gravan faktoron, kies atentado estonte helpos la plej potencon progresadon de nia Esperanto!

Por pripensado kaj ankaŭ por plej bonaj proponoj antaŭdankema, salutás la gesamideanojn

Gertrude Jalobi-Chernitz



KORESPONDADO

Sro. M. S. : Bonvolu sciigi al ni la aŭtoron kaj lingvon el kiu vi tradukis *La Hirundo'n* kaj en kiu libro aŭ gazeto ĝi aperis. Ni ne opinias dece kaŝi la nomon de l' aŭtoro.

Sroj. Delegitoj kaj Subdelegitoj : Dum la Decembra monato vi ricevos oficialan skribaĵon rajtigantan vian delegitecon por la jaro 1912³: se iu el vi ne ĝin ricevas bonvolu peti ĝin de ni.